Matthias Claudius,

# La stelrigardantino

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Dum ĉiuj homoj tie ĉi
jam dormas post labor',
la stelojn alrigardas mi
dum noktomeza hor'.

Iradas ili dise jen
Samkiel ŝafidar',
jen ankaŭ kiel perloj en
la vic'aŭ kiel ar'.[2]

Brilegas tuta la ĉiel',
majesta estas ĝi!
Min ravas tiu pur' kaj bel',
kaj ne satiĝas mi.

Ekzistas sub ĉielo ĉi
- ĝin sentas mia kor' -
ja bona io multe pli
ol ĝojo kaj dolor'.

Mi sur la liton ĵetas min
kaj ne ekdormas mi;
en mia sens' serĉante ĝin,
sopiras mi je ĝi.

. . .

Matthias Claudius,

# Die Sternseherin

Ich sehe oft um Mitternacht,
wenn ich mein Werk getan,
und niemand mehr im Hause wacht,
die Stern am Himmel an.

Sie gehn da, hin und her zerstreut,
als Lämmer auf der Flur,
in Rudeln auch und aufgereiht
wie Perlen an der Schnur.

Und funkeln alle weit und breit
und funkeln rein und schön;
ich seh die große Herrlichkeit
und kann mich satt nicht sehn.

Dann saget unterm Sternenzelt
mein Herz mir in der Brust:
Es gibt was Bessres in der Welt
als all ihr Schmerz und Lust.

Ich werf mich auf mein Lager hin
und liege lange wach
und suche es in meinem Sinn
und sehne mich danach.

. . .

[2] aŭ: la vico de stelar'.

*Traduko de la Germana poemo "Die Sternseherin" de* MATTHIAS CLAUDIUS *(∗1740-08-15 – †1815-01-21) en Esperanton de* MANFREDO RATISLAVO *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04) en 1995-04.*

*279-4 / Arg-408-806 (2007-04-24 10:09:10)*

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas* MATTHIAS CLAUDIUS *(∗1740-08-15 – †1815-01-21).*

*Arg-408-805 (2007-04-24 09:49:43)*